# *Kubo ne eksportas benzinon asertas la petrolkompanio Cupet*

*Image not found or type unknown*

Havano,  apr 24 (RHK Néstor Pérez Franco, ?enerala direktoro de Kuba Petrolo-Unio (Cupet), certigis, ke la lando ne eksportas benzinon, ?ar nacia konsumo ne estas garantiita.

En deklaroj al la kuba gazetaro, la mana?ero ripetis, ke de pluraj monatoj Kubo havas limigojn al la importado de rafineblaj naftoj kaj deriva?oj de dizelo kaj benzino, kaj tio malebligis, ke la rafinejoj de la lando da?rigu la prilaboradon kiel ili devus, por garantii konsumon de la ekonomio kaj la civitanaro.

Unu el la plej proksimaj provizantoj, li klarigis, malgra? havi sennombrajn produktadlimojn, ili garantiis la provizon de iuj produktoj, kiuj iom mildigas la ekzistantan situacion, sed ne kovras ?iujn postulojn de la ekonomio kaj la lo?antaro.

Pérez Franco certigis, ke la gvidado de la Kuba Registaro konstante atentas la malkontenton pro la manko de fuelo kaj taksas solvojn.

"Ni ne povas permesi ke aferoj estu misprezentitaj, nek krei pli da malkontentoj ol ni jam havas pro la mankoj, kiujn ni ?iuj suferas, kaj kiujn ni laboras por redukti kiel eble plej balda?", li emfazis.

Li aldonis, ke la lando anka? ne havas sufi?e da rafinebla krudo por ebligi plene ekspluati ekzistantajn rafinkapablojn.

"Kvankam estas vere, ke ili povus garantii la konsumadon de la lando, pro la limigoj truditaj  al ni en importado kaj la altaj prezoj en la merkatoj, estas tre malfacile por la lando aliri ?i tiun produkton", li argumentis.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/320558-kubo-ne-eksportas-benzinon-asertas-la-petrolkompanio-cupet

**Radio Habana Cuba**